# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (880) • 2010 •


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

*Kien mi iras – Vi !*
*Kie mi staras – Vi !*
*Nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi !*
*Vi – Vi – Vi !*

*Se mi bonfartas - Vi !*
*Se mi suferas - Vi !*
*Nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi !*
*Vi – Vi – Vi !*

*Ĉielo – Vi ! Tero – Vi !*
*Supre – Vi ! Malsupre – Vi !*
*Kien mi turniĝas – kie finiĝas,*
*Nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi !*
*Vi – Vi – Vi !*

## *VI*

Martin Buber (1878-1965)

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Vi – poemo de Martin Buber | 1 |
| Saluto de la prezidanto | 3 |
| Kio okazas al tiu ĉi mondo | 4 |
| El nia preĝlibreto | 6 |
| Rakonto el Novjorko | 7 |
| Iom pri korektado | 8 |
| Tero kaj Espero – geologio kaj teologio | 9 |
| Sub la sankta signo de l'espero | 16 |
| Kristanaj ŝercoj | 19 |
| Ŝercoj kolektitaj (1) | 20 |
| Beregdaróc | 21 |
| Informetoj | 23 |
| Vi (Joruba poemo) | 24 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

La tempo rapide foriras. Jam mi komencas mian sesan jaron kiel redaktoro de Dia Regno! Estas interesa laboro kaj mi volas danki ĉiujn, kiuj kontribuis kaj daŭre kontribuas per diverstipaj artikoloj. Tiuj artikoloj ankaŭ bone montras la diversecon de nia membraro. Certe vi kiel leganto ĝuas la enhavon.

La preparo de la ĉi-jara kongreso bone evoluas kaj jam aliĝis 36 partoprenontoj. Esperiga nombro sed mi tamen esperas ke multaj geamikoj ankoraŭ aliĝos. Pli da informo pri la kongreso vi trovos ĉi-numere. Se vi perdis la aliĝilon vi povas kontakti la sekretarion.

# Saluto de la prezidanto

Philippe COUSSON, FR





KARAJ GEFRATOJ, POST unu jaro, estos al ni jubileo. En 1911 estis fondita en Antverpeno dum la UK nia ligo, kun la tiama nomo de KEL.

Tiu nova ligo estis la rezulto de la konvinkita laboro de la germano Paul Hübner.

Nia nuna periodo ne plu similas en multaj rilatoj al tiu de la komenco de la 20a jarcento. Nia ligo ŝajnas troviĝi en tiel kritika situacio, ke eble ĝi ne pli aĝus ol unu jarcento.

Nia ligo vivas per niaj du ĉefaj aferoj: nia kongreso kaj nia revuo.

Niaj celoj restas antaŭ ni:

*konatigi Esperanton inter kristanoj*
kaj
*anonci la Evangelion inter Esperantistoj.*

Niaj fortoj estas nenio, krom per Tiu kiu estas nia forto. En Li ni estas esperantoj.

Niaj spertoj, homaj kaj spiritaj, restas por ni kuraĝigoj por daŭrigi plu la iron.

Tiu nuna nova jaro, kiun mi deziras bona al ĉiu el vi, estu de ni al ni pruvo ke nia laboro ne estas vana.

Ĝis baldaŭ, en la revuo, aŭ dum la kongreso en Beregdaróc.

Philippe Cousson,
Via prezidanto

# Kio okazos al tiu ĉi mondo

Nikola UZUNOV, ĤASKOVO

SE ONI ĴETUS rigardon al la grandaj procezoj de la monda historio en la lumo de la Biblio, oni facile povus veni al la konvinko, ke ni vivas en la fino mem de la lasta tempo. Do, la suprestarigita demando estas tute aktuala. Apenaŭ sur la tero estas pensanta homo, kiu almenaŭ por si mem ne direktis la demandon: *"Kio okazos al tiu ĉi mondo?"* La demando koncernas ne nur la kredantojn en Dio, sed ankaŭ ĉiujn homojn sur la tero.

Se ni ĵetus rigardon al la tutmonda politika, ekonomia kaj ekologia situacio en nia tempo, ni nepre rimarkus, ke la situacio en la mondo fariĝas ĉiam pli malĝojiga. Nur dum la 20a jarcento la homaro spertis du mondmilitojn, sed tio tute ne estas ĉio. Post la fino de la Dua Mondmilito okazis almenaŭ 150 militkonfliktoj en diversaj mondopartoj kun pli ol 30 milionoj da murditoj. Tio daŭras ankaŭ en la nova 21a jarcento, kaj ŝajne la amasmortigoj kaj la teroristaj agoj ne havos finon.

Al ĉio ĉi oni devus aldoni ankaŭ la inventojn kaj la aliajn atingojn de la pekanta homa menso, per kiu sub la formo de intensa scienc-teknika progreso, oni neniigas la naturajn vivkondiĉojn sur la tero. Tute ne estas sekreto, ke preskaŭ ĉiuj sciencaj inventoj kaj eltrovoj de la homa genio estas uzataj unualoke por militaj celoj.

Senĉesa ekologia polucio kaj neniigo de la ĉirkaŭanta nin vivmedio, maldikiĝo de la defenda ozontavolo de la atmosfero, degelado de la glacioj ĉe la polusoj kaj plialtigo de la nivelo de la mondoceano, plialtiĝo de la tera temperaturo kaj gravaj ŝanĝoj en la mondklimato, ĉio estas postsekvo de la intensa ekonomia agado, plejparte de la evoluintaj landoj en la mondo. Ĉio ĉi jam transformiĝis en mondan problemon.

Tie ĉi oni devus enkalkuli ankaŭ militajn kaj aliajn teknologiojn de la nukleaj ŝtatoj, kiuj per sia furioza konkurado fariĝas minaco por la mondpaco kaj por la supervivo de la homaro, kaj same tiel ankaŭ la teroristajn militagojn sur religia kaj kriminala bazo, kiuj fariĝas ĉiam pli grandskalaj.

La nekontrolebla bazaro de ĉiuspecaj preseldonaĵoj, malbonmoraj elsendoj de



televizioj kaj aliaj amasmedioj, la multaj paĝaroj de la tutgloba elektronsistemo por komunikado Interreto, kiuj per siaj distraj programoj kaj ĉiam pli senhontaj produktaĵoj, kondukas senhalte al morala degradiĝo plejparte la junulojn.

Sur la fono de ĉiuj ĉi enormaj problemoj de la homaro, la reago de ŝtatgvidantoj en politika, ekonomia, scienca kaj aliaj sferoj de la vivo, montras plenan senfortecon. Tion montras tutmondaj forumoj, dum kiuj kvazaŭ oni pridiskutadas tiujn problemojn sur plej alta ŝtatnivelo. Ekzemple tiu, kiu okazis en decembro 2009 en la danlanda ĉefurbo Kopenhago, kies rezultoj estis vere ŝokaj: Ne estas respondo! Ne estas eliro!

Kial okazas ĉio ĉi?

La kaoso en la mondo fariĝas kaj daŭre fariĝos ĉiam pli granda, ĉar la plimulto de la homoj ne turnas sin al la Fonto, al la ununura Komenco de ĉio vivanta – al Dio! Multaj eĉ ne deziras aŭdi, ke denove oni parolas pri Dio! Multaj eĉ nun riproĉus min, ke la fido en Dio estas io intima por ĉiu homo, ke oni ne devus tro afiŝi tion publike ktp.

Tamen se ni volus ricevi respondon al nia supre starigita demando, ni devus plenkonscie nin turni denove al nia Kreinto! Kaj ne simple por kontentigi nian scivolemon, sed plene kaj celkonscie esplori la Biblion, ĉar ĝi estas la ununura fidinda fonto, kiu povus diri al ni, de kie venas kaj kien iras nia mondo.

Do, kion diras al ni la Biblio pri la problemoj de la homaro? Ĝi parolas per kategoria voĉo:

1. Dio estas la Kreinto de la mondo.
2. Dio estas la Savanto de la mondo.
3. Dio estas la Perfektiganto de la mondo.

Kreado, Savo kaj Perfektigo de la mondo – tio fakte estas la esenca enhavo de la Dia revelacio al ni, aŭ dirite alimaniere: La sama Dio, Kiu kreis iam la mondon kaj per Sia Filo elaĉetis ĝin de la peko, povas ĝin perfektigi kaj Li sendube faras tion.

> La plej grava en ĉi tiu okazo estas, ke Dio mem deziras al ni doni eternan savon. Sed tiu savo estas ekskluzive en Lia Filo Jesuo Kristo

La Dia volo estas direktita al nia persona savo. La pereontaj homoj devas esti savitaj, la pekuloj devas atingi eternan vivon, kiun Dio promesis en Sia Vorto *"volante, ne ke iuj pereu, sed ke ĉiuj venu al pento"* (2 Petro 3: 9).

Antaŭ ĉio ni devas kompreni, ke la Dia volo por savo prezentas imponan kaj eternan planon, kiu konsistas el la tempo de antaŭ la kreo de la mondo, el la nuna periodo de savo de la mondo, kaj el la sekvanta mondo de *"nova ĉielo kaj nova tero"* (Apo. 21: 1), kiun Dio kreos.

Tiu Dia savplano atingis sian pinton en Lia Filo – Jesuo Kristo. Nome en

Kristo unuiĝas ĉio, kio estas sur la ĉielo kaj sur la tero, ĉar sur la kruco Li por unua kaj por lasta fojo venkis la abismon, kiu dividas nin de Dio pro la peko, kaj tial Li fariĝis la ununura ponto inter la ĉielo kaj la tero:

> *"Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj"*.(Agoj 4:12)

La plej grava en ĉi tiu okazo estas, ke Dio mem deziras al ni doni eternan savon. Sed tiu savo estas ekskluzive en Lia Filo Jesuo Kristo.

En unu el siaj epistoloj apostolo Paŭlo denove kategorie emfazas la Dian volon por tutmonda savo. Tie li diras, ke Dio *"volas, ke ĉiuj homoj estu savitaj kaj venu al la scio de la vero"* (1 Tim. 2: 4).

Tio estas absolute necesa, ĉar ĉiu homo laŭ sia peknaturo estas perdota. Pro la peko li bezonas savon ĉiupreze!

Kial la homo bezonas savon?

La homa savbezono estas rekta postsekvo de la pekoariĝo de niaj pra-gepatroj. Adamo pekis kaj trenis la tutan homaron post si en pekon. Sed la peko kondukas al morto. Pro tio ĉiuj homoj senescepte estas por ĉiam perdotaj kaj mortontaj. Ili akre bezonas savon de Kristo. Pri tio nin instruas la Biblio:

1. Ĉiu homo devas sin turni al Dio.
2. Ĉiu homo devas penti pri siaj pekoj.
3. Ĉiu homo per fido devas akcepti persone por si mem la savon de Kristo.

Dio antaŭvidis tiun savon por ni jam antaŭ la kreado de la mondo. Ĝi sin bazas entute sur la jam farita sava faro de Jesuo Kristo sur la kruco kaj tial ni, la homoj povas fari nur du aferojn: Akcepti aŭ rifuzi tiun grandan donacon – la eternan vivon! De tiu nia decido ni difinos nian eternecon!

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus




**2. februaro**

Potenca Dio, donu ke Via volo ankaû estu la mia. Mi ne sopiru al io ekster Vi. Ĉio, kio estas bona, alportu ĝojon, kaj mi transdonu tiun ĝojon al aliaj.

# Rakonto el Novjorko

Jacques TUINDER, NL

*La ĉielo donu al ni inventemon*
*kaj akran vidpovon...*

ANTAŬ NELONGE MI legis interesan rakonton, kiun mi ne maldonu al legantoj de nia revuo. Mi trovis ĝin en artikolo temanta pri interna silento, pri koro kiu scias sin sekura kaj elaŭdata de la ĉielo.

La 76-jaraĝa Mustafo vivas jam pli ol kvardek jarojn en Novjorko. Pro tio ke estas la oportuna tempo, li tre ŝatus planti terpomojn en sia ĝardeno. Sed bedaŭrinde li nun estas sola, ĉar lia filo Akmedo restadas en Irako. Tial li decidas sendi jenan e-poŝtan leteron al sia filo:

*Kara Akmedo. Mi estas ege malĝoja, ĉar mi nune ne kapablas planti terpomojn en mia ĝardeno. Mi estas certa pri tio, ke vi helpintus al mi ŝpati la ĝardenon, se vi estintus ĉi tie. Kion fari? Mi devas akcepti mian situacion, mian sorton, kaj iel preĝi kaj esperi. Vin mi amas, via patro.*

La filo tuj responde reskribas:

*Kara patro, absolute nenion tuŝu en la ĝardeno, nek mane nek piede! En ĝin mi nome sekrete kaŝis objekton ege danĝeran kaj facile eksplodigan. Kompreneble mi vere kaj sincere amas vin. File kaj sindoneme via, Akmedo.*

Depost tio ne pasas eĉ du horoj, kaj vidu! Subite, alarme kaj amase, alvenas, unu post la alia, militistoj, policistoj, eksplodspecialistoj, fajrobrigadistoj, brankardistoj kaj diversspecaj aliaj -istoj. Ĉiuj intence haltas antaŭ la domo de la maljuna viro. Ili tuj komencas singarde sed energie ŝpati la ĝardenon, profunde kaj funde traserĉante ĉiun kvadratmilimetron. Sed finfine ili trovas nenion suspektindan. Rezulte, ili devas, unu post la alia, forlasi ĉi lokon seniluzie, sed sendube tute taŭgan por novkulturado...

Ankoraŭ la saman vesperon la alt-aĝa Mustafo ricevas elektronikan mesaĝon de sia filo:

*Kara patro, tre verŝajne la ĝardeno nun estas perfekte ŝpatita. Vi do trankvile povas planti viajn terpomojn. Konsiderante la grandan distancon, mi ne kapablis fari por vi multe pli. Mi vidis ke vi havis grandegan problemon. Espereble tro laŭtajn protestojn kaj fortajn murmurojn vi ne aŭdis. Mi ĝojus, se vi sciigus al mi, ke vi estas tute*

*kontenta kaj spertis ke vere vin mi amas. Plej kore, via Akmedo.*

Ĉiutage mi direktas min al homoj ĉirkaŭe, mantre dirante: *"ni donu esperon al tiuj kiuj esperas ricevi lumon en la okuloj*." Kaj neniam mi neglektas preĝi al la ĉielo:

*"Kara Patro, milionoj da viaj infanoj kaj miaj gefratoj en malriĉaj landoj estas nenecese blindaj. Same kiel Mustafo mi jam havas 76 jarojn, el kiuj pli ol 43 mi serioze kaj senlace klopodis batali kontraŭ la terura evitebla vidhandikapeco. Sed dum tiu kvardektrijara vivo-periodo tiuj milionoj da atendantoj nur draste kreskis, dum via promeso estas... Bonvolu sendi iom pli da forto kaj lumo el la ĉielo, ĉar kion mi faru sen Vi? Vin mi amas. File via, Jacques."*

Mia e-poŝta adreso estas:
zienderogen@casema.nl.
Vidu ankaŭ:
www.stichtingzienderogen.nl

# Iom pri korektado

KIAM MI PREPARANTE Dia Regno-n tralegas la kontribuojn kaj poste diskutas korektindaĵojn mi ofte rimarkas niajn variajn uzadojn de Esperanto kaj niajn diversajn lingvajn fonojn. La literumado kutime nur estas hazardaj eraroj kaj facile korekteblaj. Poste venas la elekto de vortoj kaj vortordo sed ankaŭ la uzado de la difina artikolo kaj la prepozicioj. Kio estas (mal)bona lingvouzo kaj kiomgrada estas persona stilo, eble iom nekutima sed tamen ĝusta kaj komprenebla? Ofte ni rimarkas la influon de la gepatra lingvo. Ĝi similas kelkfoje la uzadon en Esperanto, laŭ nia kompreno, aŭ pli precize inverse. Precipe interesa, laŭ mi, estas la uzado de la difina artikolo inter ni kiuj uzas artikolon en niaj gepatraj lingvoj. Ne tute similas inter ni.

Mi devas konfesi ke mi, studante Esperanton antaŭ multaj jaroj, ne tro zorge tralegis tiun paragrafon en la esperanto-gramatiko ĉar mi opiniis la uzadon tre simpla kaj natura. Sed mi devas ŝanĝi mian opinion. Laŭ André Cherpillod en artikolo en Heroldo (12/2144) ni mis-uzas kaj eĉ mis-neuzas la artikolon. Li donas multajn ekzemplojn, eĉ el la Biblio, de diversmanieraj uzoj: *"la pastro Aaron"* (Lev. 1,7) kaj sen-artikola uzo *"reĝo Arfaksad"* (Judit 1,5). Ĉu temas pri lingva evoluo aŭ aliaj lingvaj fonoj, sed certe ne eraro. Ankaŭ nia Preĝlibreto (vidu paĝo 6 ĉi-numere: *"la mia"*) uzas la artikolon iom alie ol mia kutimo, sed ĉu eraro? Do ne ĉiam estas facile korekti tekstojn.

/Red.

# Tero kaj Espero – geologio kaj teologio

## Prelego dum la ekumena kongreso en Vroclavo, julio 2009

DUDICH, Endre, HU

[Ni vivas] …*kun espero, ke la kreitaro mem ankaŭ liberiĝos el la sklaveco de pereo en la liberecon de la gloro de la idoj de Dio"*. (Rom.

### 1. La libro de Dio

"*Gloregas Dion, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Vere Dio estas la memsufiĉa, la laŭdeginda. Se ĉiuj arboj kiuj estas sur la tero estus plumoj, kaj la maro – inko, kaj la sep oceanoj estus aldonitaj al ĝi, tamen ne elĉerpiĝus la vortoj de Dio."* (Korano 31, 27.28).

Laŭ Mohamedo la Judoj, la Kristanoj kaj la Moslimoj estas "posedantoj de la Libro", t.e. de la Sankta Skribo, de la revelacio de la unusola Dio, kreinto *"de la sep teroj kaj sep ĉieloj"*.

Sed tuj prezentiĝas problemoj.

- Kiaj konkretaj skribaĵoj apartenas al la Sankta Skribo?
  - Ĉu nur la t.n. Malnova Testamento?
  - Ĉu ankaŭ la Nova Testamento?
  - Plej ekstreme, ĉu ankaŭ la Nobla Korano?
- Kiu decidos pri tiu, kiu skribaĵo estas *kanona*, kaj kiu *apokrifa*, do akceptenda, respektive forĵetenda?
- Kiu, aŭ kia institucio rajtas interpreti kaj komenti la Sanktan Skribon?
- Ĉu estas permesite mistrakti, persekuti aliepensantojn?

Ni ja ĉiuj scias, ke la respondoj al ĉi-tiuj bazaj demandoj estas ege diversaj,



eĉ kontroversaj. Kaj tio havis bedaŭrindajn, eĉ hontindajn, tragikajn konsekvencojn dum la historio de la homaro, inkluzive la nuntempon. Mi diras nur unu vorton: Jugoslavio.

Tutmaniere, por ni Kristanoj, la *Biblio* estas nia komuna trezoro, pli granda valoro ol oro.

En Hungario, la spiritaj gvidantoj de la tri t.n. historiaj eklezioj, la katolika, la luterana kaj la kalvinana, kune deklaris la jaron 2008 "*Jaro de la Biblio*". La devizo estis:

*Feliĉa estas, kiu legas ĝin.*

**2. La Libro de Naturo**

Eĉ la antikva ĉina saĝulo Lao-ce sciis, ke "*La Homo iras la vojon de la Tero, la Tero iras la vojon de la Ĉielo*". (Tao-te-king 25)

Usona poetino (*Catherine Faber*) opiniis: "*Jes ja, hom-skribita estas la Biblio, sed la rokojn tute certe kreis Dio.*"

La OUN (Organizo de Unuiĝintaj Nacioj) deklaris la saman jaron 2008 *Internacia Jaro de la planedo Tero.*

La IUGS (Internacia Unio de Geologiaj Sciencoj) difinis dek ĉefajn, prioritatajn temojn. Jen ili, kun paralelaj citaĵoj el la Biblio (elektitaj de K. Brezsnyánszky, geologo, prezidanto de la Hungara Nacia Komisiono pri la Internacia Jaro de la planedo Tero):

1. La subsurfacaj akvoj – la plej granda provizo de trinkakvo *…ĉar en la dezerto elfendiĝos akvo kaj en la stepo riveroj...* (Jes. 35,6)
2. La naturaj danĝerfontoj minacantaj la homajn komunumojn *...kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj sin ĵetis sur tiun domon, kaj ĝi falis...* (Mat 7,27)
3. Tero kaj sano – por konservi la sanan vivmedion. *La lando, kiun ni trapasis por esplorrigardi ĝin, estas lando, kiu formanĝas siajn loĝantojn...* (Nom. 13,32)
4. Ŝanĝiĝoj de la klimato – dum la terhistorio kaj nun. *Kaj mi vidis, jen malkvieta vento venis el la nordo kun granda nubo kaj flamanta fajro; ...* (Jeĥ. 1,4)
5. Konscia mastrumado pri la energifontoj kaj mineralaj krudaĵoj. *La arĝento havas lokon, kie oni ĝin elakiras; Kaj la oro havas lokon, kie oni ĝin fandas. La fero estas ricevata el polvo, Kaj el ŝtono oni fandas la kupron...* (Ijob 28,1-2)
6. Esploro de la terinterno, ekkono de ties strukturo. *La ĉielo estas alta, la*



*tero estas profunda, Kaj la koro de reĝoj estas neesplorebla.* (Sen. 25,3)

7. Esploro de la oceanoj kovrantaj du trionojn de la tersurfaco. *Kaj Dio nomis la sekaĵon Tero, kaj la kolektiĝojn de la akvo Li nomis Maroj* (Gen. 1,10)
8. Kreado de scienca bazo por la sekura konstruado kaj funkciigo de megapolisoj. *Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon* (Gen. 11,4)
9. Daŭrigebla utiligado de la grundoj *Kaj vane konsumiĝos via forto; via tero ne donos siajn produktaĵojn,...* (Lev. 26,20)
10. Protekto de la biosfero, de la vivularo de la Tero. *Kaj Dio diris: La akvo aperigu moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo.* (Gen. 1,20)

La Hungara Nacia Komitato aldonis unu temon pli:

11. Nia protekta ŝildo – la magneta kampo de Tero.

La kompetentaj fakuloj kunvenintaj en la centro de UNESKO (Parizo) formulis kaj akceptis Deklaron, kun la devizo: *"Ni igu la Teron pli agrabla hejmo de la homaro!"*

Ili deklaris kvin postulojn al la decidofarantoj de la mondo, ke ili:

1. liberigu la tuton de la pri-tera informaro;
2. ne malhelpu, sed instigu la akiron de novaj ekkonoj kaj inventoj;
3. subtenu la diversajn aranĝojn de la Internacia Jaro de la planedo Tero;
4. prilabor(ig)u novajn strategiojn de longtempa daŭrigebla disvolvo;
5. plibonigu la kondiĉojn de la instruado de la tersciencoj sur ĉiuj niveloj.

**3. Ni legu ambaŭ librojn!**

La Hungara Nacia Komisiono pri la Internacia Jaro de la planedo Tero decidis organizi kunvenon por ekzameni kaj pridiskuti, ĉu ekzistas aŭ ne reala konflikto inter la kristana religio kaj la nuntempa stato de la terscienco, pli ol 350 jarojn post la fi-fama kontroverso inter la ter-centra planedsistemo de la antikva Greko *Ptolemajo* kaj la sun-centra sistemo de la Polo – torunano – *Nikolao Koperniko*.

Ekzemple:

- o Ĉu la Tero estiĝis dum
  - ses tagoj, kiel rakontas la plej unua ĉapitro de la Biblio (1 Mos.1),

  aŭ
  - kelkaj jarmiloj, kiel kalkulis iuj rabenoj kaj teologoj, (ekz. la irlanda ĉefepiskopo *James Ussher* en 1654 elkalkulis 4004 jarojn, do nia jaro 2009 estus la 4359-

  aŭ
  - preskaŭ kvin miliardoj da jaroj, kiel asertas la geologoj surbaze de la esploroj pri la radiaktiva disfalo de iuj elementoj?
- o Ĉu la vivuloj – mikroorganismoj, plantoj, animaloj kaj la Homo
  - estas kreitaj de Dio senpere, unuope., *"laŭ siaj specioj"*, kiel la Svedo

*Carl von Linné* ankoraŭ opiniis en la 18-a jarcento,

aŭ

- ili evoluis paŝo-post-paŝo dum la terhistorio, laŭ la Franco *J. B. Lamarck*, la Brito *Charles Darwin* kaj aliaj biologoj?

o Ĉu iuj miraklaj eventoj priskribitaj en la Biblio, kiel ekzemple
  - la diluvo,
  - la sekpieda trapaso de la Ruĝa maro,
  - la pereo de la urboj Sodoma kaj Gomora estas terscience klarigeblaj?

o Kion ni opinias pri la estonto – kaj ebla apokalipsa fino – de nia Tero?

La ideon favore akceptis ambaŭflanke la kompetentaj instancoj, kaj dek civilaj organizaĵoj. Inter ili estis la Kalvinana Universitato *Gáspár Károli* de Budapeŝto tra la Luther-Asocio ĝis la Hungaria Geologia Societo.

El ties kunlaboro rezultis publika konferenco aranĝita la 16 – 18-an de oktobro 2008, en la *Ferenc Liszt* Kultura Centro de la okcident-hungaria urbo Sopron.

La altaj protektantoj estis unuflanke lia Eminenco kardinalo *Péter Erdő*, ĉefepiskopo de Esztergom-Budapeŝto, primaso de Hungario, kaj aliflanke profesoro pri fiziko *József Pálinkás*, prezidanto de la Hungara Akademio de Sciencoj.

Malfermis la aranĝon la urbestro de Sopron kaj la rektoro de la Okcident-hungaria Universitato.

Sep teologoj kaj dek-tri natursciencistoj prezentis entute 20 prelegojn. Jen kelkaj titoloj kaj aŭtoroj.

- La Ĉielo en la antikva orienta mondkoncepto (*I. Karasszon*, kalvinana teologo)
- Kaŝitaj aspektoj de la rakonto de la Biblio pri la kreado (*J. Zsengellér*, kalvinana teologo)
- Kunligiĝo de Tero kaj Ĉielo en la natursciencoj (*S. Bérczi*, astronomo)
- Ekkono nun laŭ parto…
  (*T. Zelenka*, geologo)
- La geologia principo de aktualismo (ke ĉiam agadis la samaj fortoj kiuj nun) ĉe la Ekleziulo kaj ĉe la apostolo Petro (*T. Madarász* inĝenier-geologo, resp. *I. Viczián*, geologo)
- La evolu(ci)o el la vidpunkto de praktikanta geologo (*J. Kókay*, geologo)
- Profundaj terhistoriaj radikoj de la homiĝo (*J.Sipos*, biologo, katolika monako)
- Scienco kaj religio – en la inundo de pseŭdosciencoj kaj pseŭdoreligioj, kun speciala atento al la fenomeno New Age (*L. Szarka*, geofizikisto). Ĉi tiu prelego elvokis speciale grandan intereson.
- Ebla terscienca ekspliko de kelkaj bibliaj eventoj (*G. Vitális*, geologo)
- Kristana interpreto de la evoluo (*P. Bolberitz*, katolika teologo)
- Evoluciista hungara katolika prelato (*O. Prohászka*) en 1902 (*E. Dudich*, geologo)

- La motivo de nova ĉielo kaj nova tero en la Apokalipso (*G.Vladár,* kalvinana teologo)

Poste ĉe "ronda tablo" tri teologoj (katolika profesoro pri teologio, kalvinana episkopo, luterana vicepiskopo) kaj kvar natursciencistoj (geofizikisto, kemiisto, kaj du geologoj) klopodis ordigi la diritaĵojn kaj tiri konkludojn. Gvidis la interparoladon *J. Juhász*, direktorino de la budapeŝta Katolika Radio.

Ankaŭ mi prelegis, kaj havis la honoron partopreni en la rondtabla konversacio, reprezentante la budapeŝtan Filozofian Diskutrondon. Kompreneble mi substrekis la rolon kiun devas ludi la filozofio, kiel ponto inter la naturscienco kaj la teologio.

Ĉeestis 100 – 150 aŭskultantoj, kiuj povis rigardi ankaŭ escepte riĉan ekspozicion de variaj eldonaĵoj de la Biblio en multaj lingvoj, kaj aŭskulti poeziaĵojn kaj kantojn.

Jen la resumaj dek punktoj.

1. Naturaĵo kaj supernaturaĵo, scio kaj kredo, scienco kaj religio ne estas kontraŭdiraj, sed komplementaj.
2. Kontraŭ ties kontraŭstarigo kaj intenca konfliktigo la natursciencistoj kaj la teologoj devas agi kune, speciale kontraŭ la pseŭdosciencoj kaj pseŭdoreligioj.
3. La ekkono per kredo ne ekskludas la ekkonon per racio, sed larĝe malfermas ĝin; ne detruas ĝin, sed konstruas sur ĝin.
4. Ĉi tiu konferenco demonstris, ke la tersciencistoj kaj la teologoj pretas kaj povas kompreni la faklingvaĵon unu de la alia.
5. Koncerne ambaŭ fakojn terura manko de konoj kaj perdo de valoroj karakterizas la ĝeneralan opinion de la socio.
6. Ni devas prezenti kaj la malkovrojn de la scienco, kaj la bonajn novaĵojn



de la religio en lingvaĵo komprenebla por nefakuloj / laikoj.

7. Ĉiuj-ĉi devas iĝi libere alireblaj por ĉiu, eluzante la eblecojn de la medioj/amaskomunikiloj.
8. La principo de necesa kaj sufiĉa kaŭzo devas esti konsekvence aplikata.
9. La "malpleniĝintajn" nociojn kaj terminojn ni metu flanken, sed ni reprenu la neglektitajn-forgesitajn valorojn, en nova, aktuala formulado.
10. Nia estonto estas ne-antaŭdeterminita, kaj por ni antaŭsciebla, ĉar la Homo havas parton en la libereco de Dio.

Pri la evento raportis pluraj gazetoj kaj forme de intervjuoj ankaŭ la Katolika Radio.

La materialo de la Konferenco jam aperis ankaŭ libroforme en Budapeŝto, ĉe la eldonejo *Hantken*, 140 p., kun anglalingva resumo.

**4. Malsamaj opinioj**

Do oni povus pensi: bonege, ĉio estas en ordo, la fantomo de imagita kontraŭdiro estas forpelita. Bedaŭrinde tio estas iluzio.

Krom tiuj, kiuj pro diversaj kialoj forĵetas aŭ tutsimple ignoras la Biblion – liberpensuloj, agnostikuloj, skeptikuloj, ateistoj ktp. – estas kaj restas kontraŭuloj ankaŭ de la alia ekstremo: adeptoj de la (nova) kreadismo (*Creation Research*) kaj fundamentistoj, kiuj akceptas laŭvorte la Biblion.

La 13-14-an de decembro 2008 okazis en Hungario alia konferenco, ĉifoje en la orient-hungaria urbo Debrecen, *GeMini* (Genezo Mini Konferenco – Mirakloj de la Kreado).

Organizis ĝin la Protestanta Kreadesplora Rondo de la Asocio de la Biblio, kaj la Asocio de Kreado.

Estis prezentataj studoj, kiuj neas la evoluon de la tera vivularo, kaj interpretas laŭvorte la rakonton de la libro de Genezo pri la ses-taga kreado. La temoj pritraktitaj estas:

- sciencaj faktoj apogantaj la biblian rakonton pri la kreado



- mirakloj de la kreado: post la diluvo, en la ĉelo, en la genetiko, en la homa korpo, en la paleontologio (la scienco pri la iamaj vivuloj).

**5. Kaj ĉi-jare?**

2009 estas jubilea jaro: nome la 150-a datreveno de la apero de la fama verko de *Charles Darwin*. Ties kompleta titolo estas: *Pri la origino de specioj per natura selektado aŭ la prezerviĝo de favoritaj rasoj en la lukto por vivo.* (450 p., Eldonis John Murray, Londono, novembro 1859).

Jen unu kaŭzo – aŭ preteksto – pli, daŭrigi la disputadon ŝajne neniam finiĝontan. Malgraŭ tio, ke *Charles Darwin* mem deklaris je la fino de sia verko:

*"Grandioza estas tiu ideo, laŭ kiu la vivo kun siaj diversaj fortoj origine igis enspirata nur en kelkajn formojn, aŭ nur en unusolan, kaj… el tiu simpla komenco evoluis, kaj eĉ nun evoluas, senfine multaj belegaj kaj mirindaj formoj."*

Interese estas, ke la Anglikana Eklezio la 14-an de septembro 2008 oficiale petis pardonon de li:

*"Charles Darwin, 200 jarojn post via naskiĝo la anglikana eklezio ŝuldas al vi pardonpeton pro tio, ke ĝi miskomprenis vin kaj instigis ankaŭ aliulojn al tio. Homoj kaj institucioj faras erarojn, kaj la kristanoj kaj la eklezio ne estas esceptoj."*

Cetere, la nunan jaron 2009 la OUN deklaris Internacia Jaro de la Astronomio. Reviviĝas kaj pliviglîĝas la diskuto, originale scienc-fikcia, ĉu ekzistas vivaj, eble eĉ racihavaj estaĵoj sur aliaj ĉielkorpoj. Kompreneble ankaŭ tiuj demandoj estas tiklaj por kristanaj fideluloj. Do oni pasas de la afero de *Galileo Galilei* (1632) al tiu de *Giordano Bruno* (1601)

Sed tio jam neniel apartenas al la temo de la jena prelego.

**Finvortoj**

Scio kaj kredo estas la du flugiloj de la homa animo strebanta al la absoluta Vero – Dio.

*"Kion mi havas en la ĉielo, kaj en kio mi povus havi plezuron sur la tero, krom vi, Sinjoro mia? Frapu mian korpon, mian koron pereo, la Dio de mia koro, mia trezoro estas poreterne la Sinjoro."* (Psa 72,25-26)

*"Ĉar la montoj formoviĝas kaj la montetoj ektremegas, sed mia mizerikordo ne forlasas vin, kaj la alianco de mia paco ne ŝanceliĝas, jen kion diras via indulga Sinjoro."* (Esa 54,10)

----------

DUDICH, Endre (1934 Budapeŝto, Hungario)
Geologo, biologo-kemiisto, tit. Profesoro pri geologio de Okcident-hungaria Universitato (Sopron), eksa vicdirektoro de Hungara Geologia Instituto, honora prezidanto de la Filozofia Diskutrondo (Budapeŝto), eksperto de UNESKO pri tersciencoj, membro de ISAE, aŭtoro de *Ĉu vi konas la Teron?* kaj *La lumo nutranta*. Esperantisto ekde 1962, li estas Asociita profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), honora prezidanto de Hungaria Esperanto Asocio (HEA) kaj honora membro de Universala Esperanto Asocio (UEA). Prelegis en la 17-a Ekumena Esperanto Kongreso en 2005 (Piliscsaba, Hungario.)
H-1053 Budapest, Károlyi M. u. 14/B
dudich@t-online.hu

# Sub la sankta signo de l' espero

## Ekumena kongreso en Vroclavo, julio 2009

Jacques TUINDER,NL

BONVENON, KARAJ GEFRATOJ, kristanoj el diversaj eklezioj kaj el dudeko da landoj. Certe vi ĝojas, ke vi sukcesis esperplene atingi la celon de via vojaĝo. Estas bone ke vi venis. Do: bonvenon! Ankaŭ mi ĝojas ke mi ricevis la peton saluti kaj alparoli vin dum ĉi tiu ekumena liturgio. Kaj kun sincera ĝojo mi povas anonci al vi, ke ni ĉi tie, dum tuta semajno, kolektiĝos sub la *sankta* signo de l' espero. Nia espero estas kiel pura al ni farita promeso, promeso al ni, kiuj sopiras *sanktan* harmonion. Sed ni konscias pri tio, ke ni vivas en mondo tute ne harmonia, mondo en kiu regas glavoj kaj militoj, konfliktoj kaj krizoj, mondo plena de muroj kaj baroj. Sed fine venkos la *sankta* amo, kiu disbatos kaj dissaltigos ĉiujn limojn kaj aliajn obstaklojn. Jes, rilate al nia mondo ni kredas, ke Dio tiom kaj tiel amis ĝin ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu homo fidanta havu eternan vivon.



Kiom ofte ni dum nia esperantista vivo jam kantis la belan himnon, kiun verkis d-ro Zamenhof sub la nomo LA ESPERO? Certe, ĝi estas Himno, do evidente superas la rangon de Kanto! Ni bone konsciu pri tio, ke fakte LA ESPERO estas religia himno. Nelaste ĉar ni – kiel vi jam aŭdis – trifoje renkontas en ĝi la adjektivon SANKTA. Ni honoras kaj respektas d-ron Zamenhof, ĉar ni tute prave konsideras lin pioniro de la ekumena penso, aŭ pli ĝuste: de la interreligia dialogo.

Per la veno de Jesuo en la mondon estiĝis nova tempo, kiun karakterizas nova sento kaj forta voko. Tempo kiu alportas bonan mesaĝon de Dio al la malriĉuloj. Tempo kiu urĝas al konvertiĝo, renoviĝo de vivo. Tempo, kiu invitas nin al tio, kion la apostolo Paŭlo jene vortigas: *"Tiu sama sento loĝu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo"* (Fil.2, 5). Kaj kio estas tiu 'forta voko'? Ĉu ne la voĉo de la profetoj, inter kiuj ni kredas Jesuon la plej granda?

Eble vi miros aŭdante, ke mi dum kantado de la tri unuaj linioj gustumas la ĉeeston de Dio tri-unua. La kompatema Patro sentis antaŭ dumil jaroj ke

proksimiĝas la tempo plenumi promeson kaj sendi la antaŭ-diritan Mesion. La Patra Sento venis en la mondon en la Persono de Sia Filo, Jesuo. En la unua epistolo de sankta Petro ni legas, ke Dio laŭ Sia granda kompato renaskis nin en esperon vivan per la releviĝo de Jesuo Kristo el la mortintoj (1 Petr.1,3). Kaj la forta voko de Jesuo estis kaj estas kaj estos: *"Sekvu min kaj vi ne vivos en mallumo! Havu en vi la senton, kiu loĝis ankaŭ en Mi!"* Kaj ĉu ni ne povas imagi al ni 'pentekostan' blovadon, kiam temas pri 'facila Vento'. Trifoje aŭdiĝas la adjektivo SANKTA. Ĉu la Vento ne povus esti la Sankta Spirito? Kiam mi kantas La Esperon, mi subaŭdas en la teksto, ke mi havas Patron, kiu kreis min, Fraton kiu savis min, kaj Spiriton kiu sanktigis min. Tio sufiĉas por esperante iri mian vojon kaj plenumi la taskon surteran pri kiu mi sola responsas.

Kristanoj havas antaŭ la okuloj esperoplenan promeson: bela sonĝo, alloga revo, feliĉiga vizio. La unua sonĝo estas jam fakta, aktuala, nome ke Dio ripetas al ni, Siaj infanoj, la amoproklamon kiun Li adresis al Sia Filo: '*vi estas Mia elektita filo, kiu plaĉas al Mi; vi estas Mia amata filino, en kiu Mi havas plezuron!*

Apud tiu jam 'realiĝinta' sonĝo, por tiel diri, ni kredas pri estonta: la veno de la Dia Regno, Regno de justeco kaj paco, promesita lando en kiu neniu malsatos, neniu soifos, neniu mizeros, neniu suferos, neniu povros, neniu batalos, neniu vivos por si mem. En la '*Preĝo sub la Verda Standardo*' d-ro Zamenhof esprimis sian esperon, ke la Plejaltulo nin benos. Ke inter popoloj malaperos la muroj. Ke ili falos por ĉiam. Ke amo kaj vero ekregos sur tero.

Kia bela sonĝo! Sed por ke efektiviĝu tiu eterna beno, necesas, ke gefratoj kuniĝu, kaj ke plektiĝu la manoj! Necesas esperi kaj pacienci, necesas preĝi kaj labori, necesas batali.

Pli ofte mi malkaŝis mian opinion, ke ĝuste en niaj tagoj nia mond' eterne militanta urĝe bezonas saĝajn kaj fidindajn profetojn, kiuj estas samtempe instruistoj kaj gvidistoj. Laŭ mia profunda konvinko nia kara d-ro Esperanto, kiu staris en la tradicio de la profetoj de Izraelo, havis profetan voĉon, kiun ni renkontas en liaj poezio, kongresparoladoj, eseoj kaj leteroj. Ĝi estas la esenco de la 'interna ideo'.

Tio signifas: la nova sento gvidu al 'kon-sento'; kon-sento kunigu la popolojn al unu granda rondo familia; konsento faru la homaron unu komunumo de gefratoj, kiuj parolas lingvon de espero, komprenas kaj amas unu la alian. Ĉu tiu 'bela sonĝo' estas fremda al profetoj, justuloj, homoj kredantaj?

D-ro Zamenhof ne parolas pri esperantistoj, sed pri esperantoj. Kiel lia pseŭdonimo estis 'Esperanto'! Jes, esperantoj kolektiĝu sub la sankta signo de l' espero. Kio estas 'kolekti'? La vorto signifas: kunigi, aŭ pli trafe: kune legi, kune elekti. Karaj gefratoj, ni estas komunumo de homoj elektitaj, kiuj renkontiĝas por legi la Sanktan Skribon

kaj aŭdi la Vorton de Dio. Ni kolektiĝas kiel eklezio, laŭlitere 'elvokitaro'. Ni estas homoj kiuj aŭdis la vokon por poste mem disheroldi ĝin per vortoj kaj faroj. Kaj 'sekvu Min!' signifas: amu Min kaj amu unu la alian. Sankta Paŭlo skribis al la Korintanoj: "*Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj - kaj mi povus aldoni: se mi krome parolus la lingvon Esperanto – sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo.*" Laŭ d-ro Esperanto la sankta amo estas tiom forta, ke ĝi forigos barojn kaj murojn. "*La amo ĉion esperas*", kantas S-ta Paŭlo.

> *"espero, obstino kaj pacienco estas la signoj per kies potenco ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro"*

Ni ĉiuj vivas de espero. Ni esperas resti sanaj kaj fariĝi feliĉaj. Ni esperas ke ni havos bonan kaj benoriĉan kongresan semajnon. Ni esperas ke pli da homoj eklernos nian karan lingvon kaj aliĝos al nia movado. Kaj kiam mi en la jaro 1966 komencis agadon por helpi al nenecese vidhandikapitaj homoj, mi esperis ke esperantistoj aŭdos tiun fortan vokon kaj amase kunlaboros.

Esperas homo dum daŭras vivo. Sed nur de espero vivi homo ne povas: aldoniĝu fido kaj amo!

Ni ĵus aŭdis la belegan rakonton pri du pilgrimantoj, kiuj renkontis fremdulon. Ili havis tre fortan esperon. Ili nome esperis ke Jesuo estas Tiu, Kiu liberigos Izraelon. Montriĝis, ke ilia espero ne estas io abstrakta, sed ĝuste: persono, potenca persono, kvazaŭ revolucie aganta persono. Kaj kio okazis?

Ĉio malfermiĝis. La tombo en kiu enteriĝis Jesuo malfermiĝis. La nevidantaj okuloj kaj la neaŭdantaj oreloj de la Emaŭsuloj malfermiĝis. Kaj la Skriboj malfermiĝis. Tiuj homoj, kies koroj brulis kaj ardis, fariĝis disĉiploj, lernantoj, kaj la instruo komenciĝis de Moseo kaj de la profetoj. Jes, karaj gefratoj, ĉiu el ni venis ĉi tien ankaŭ por lerni, por instruiĝi, por serĉi kaj aŭdi la bonan Majstron Jesuon. Kaj Li estas Nia Espero. Li promesas sanktan harmonion, pacon, *shalom*, kondiĉe ke ni senrezerve sekvu Lin, vivu kun Liaj paroloj kaj faroj en niaj oreloj.

Kaj kiel ni sekvu? Ankaŭ ĉi tie ni povus adekvate uzi la vortojn de d-ro Esperanto: ni devas esti diligenta kolegaro. Kuraĝaj homoj. Legatoj. Ambasadoroj. Apostoloj. Ni havas mision kaj komision: preĝi kaj labori, fidi, esperi kaj ami.

En sia poemo LA VOJO, d-ro Zamenhof diras, ke *"espero, obstino kaj pacienco estas la signoj per kies potenco ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro"*. Ni esperu je Dia graco. Ni ekzercu nin pri obstino kaj preĝu por pacienco. Ni direktu niajn okulojn al la ĉielo, por ke malfermiĝu kaj malsupreniru la Spirito de Dio kiel facila Vento. Kaj ni aŭdu la vortojn de bela sonĝo en niaj

oreloj: Vi estas mia amata filo, vi estas mia amata filino.

Ni sopiru ade survoji kun Jesuo, kiu estas profeto potenca en agoj kaj paroloj antaŭ Dio kaj ĉiuj homoj. Retenu Lin kiel praktikis la Emaŭsuloj, kiuj petegis: "Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas." Ni restu ĉe Jesuo kiam Li eksidas kun ni, prenante kaj benante kaj rompante panon. Ke tiam malfermiĝu la Skriboj por instrui nin kaj malfermiĝu niaj okuloj por trovi nian vivovojon. Ke malfermiĝu niaj oreloj por aŭdi la fortan vokon. Ke la Sankta Spirito kiel facila Vento tuŝu niajn korojn kaj animojn dum ĉi tiu kongresa semajno por ke kresku la nova sento al sento vere ekumena. Al konsento pri alproksimiĝo kaj reunuiĝo.

*Amen. Tiel estu.*

# Kristanaj ŝercoj

Atentigo pri malbonaj ŝercoj. Ni konscias, ke religia humuro estas tikla afero. Sed ni esperas, ke ridante pri ni mem (kaj aliaj) ni povas igi la temon pli alirebla kaj montri al nia ĉirkaŭaĵo, ke ni kristanoj ankaŭ scipovas ridi. Se vi trovas iun ajn el tiuj ĉi ŝercoj pridubindaj, ni pardonpetas. Ni plukis ilin en diversaj kristanaj publikaĵoj, kie ili antaŭe aperis, do en paroĥaj gazetoj, kristanaj retpaĝaroj ktp. Kaj same kiel estas pri plej multaj ŝercoj, ankaŭ la aŭtoroj de tiuj ĉi estas nekonataj, sed ni dankas al ili.

Dio komprenas humuron, kaj same devus la kristanoj.

Rompiĝas la akvobaraĵo kaj la akvo rapide inundas apudan vilaĝon. Ĉiuj jam fuĝis, nur la pastro staras ĉe la turo de la preĝejo kaj preĝas. Alproksimiĝas al li boato de la fajrobrigado: "Venu, patro, ni forportos vin."

"Ne, mi restos ĉi tie, Jesuo savos min." Do la boato foriras. La akvo jam atingas la turon, kie staras la pastro kaj preĝas. Alproksimiĝas al li boato de la soldata protektantaro: "Venu, patro, ni forportas vin." – "Ne, mi restos ĉi tie, Jesuo savos min."La boato foriras. La vilaĝo jam estas preskaŭ tute inundita, super la akvo videblas nur kapo de la pastro. Alflugas helikoptero: "Venu, patro, ni ĵetos al vi ŝnuron." – "Ne, mi restos ĉi tie, Jesuo savos min." La helikoptero forflugas kaj la pastro dronas. Poste li en la ĉielo renkontas Jesuon kaj demandas lin: "Kial vi ne savis min?" – "Nu, kaj kion vi ankoraŭ dezirus? Mi ja sendis por vi du boatojn kaj eĉ helikopteron!"

# Ŝercoj kolektitaj (1)

MU Binghua, Ĉinio

- **La rekrutoj unuan fojon** estas trejnataj. Oficiro senĉese krias komandon: "Maldekstren! Dekstren! Malantaŭen! Antaŭen! Dekstren!". Unu rekruto foriras el la vico kaj la oficiro demandas: "Kien vi iras?" "Mi paŭzos kaj revenos nur kiam vi decidis al kiu direkto ni turnu nin."

- **Policano, dimanĉe,** por amuzo ĉasas bestojn. Jen li vidas leporon kurantan el herbejo, kaj la policano laŭ sia kutimo krias, levante la pafilon: "Haltu, aŭ mi pafas!"

- **Patrino venas hejmen**, kaj tuj eta Hong demandas ŝin: "Panjo, ĉu vi scias, kiom da dentopasto estas en unu tubo?" "Mi ne scias, infano mia!" "Sed mi scias, ĉar mi elpremis, ĝi atingas de la sofo ĝis la pordo."

- **Mia kvinjara filo spektas** en televido usonan desegnofilmon pri musido kaj anaso. De tempo al tempo li rideksplodas, pri kio mi tre miras, ĉar li ne scias la anglan. "Ĉu vi komprenas, kion ili interparolas?" mi do demandas. "Sed panjo," li replikas, "kiel mi kapablus kompreni la lingvon de muso kaj anaso?"

- **Kun mia naŭjara filo** ĉe bankaŭtomato mi prenas monon, sed avertas lin, ke pro sekureco neniu devas vidi nin. Kiam la aparato eligas dek tute novajn 10-juanajn monbiletojn, mia filo kun grandaj okuloj proponas: "Ankoraŭfoje, panjo! Neniu vidis nin!"

- **La edzo kontrolas** sian monujon kaj furioze riproĉas: "Nia knabaĉo ankoraŭfoje forprenis monon!" La edzino replikas: "Kiel vi povas esti certa, ke ŝtelisto estis nia filo? Eble ja mi prenis la monon?" La edzo skuas la kapon: "Ne. Ne vi prenis la monon, ĉar oni ne ŝtelis la tuton."

- **"Mi aŭdis, ke sinjoro** Ĝang enhospitaliĝis." "Kial? Hieraŭ vespere mi ankoraŭ vidis lin danci kun ĉarma fraŭlineto." "Jen la kaŭzo de la enhospitaliĝo. Ankaŭ la edzino vidis ilin."

# BEREGDARÓC

MIAJ KARAJ GEFRATOJ, kore mi salutas vin ĉiujn kiel organizanto de la ĉijara KELI-kongreso en Hungario, en Beregdaróc. Kun granda ĝojo mi povas diri, ke jam 36 partoprenantoj aliĝis el naŭ landoj al nia renkontiĝo – kiel vi povas vidi en la listo. Certe vi trovos malnovajn geamikojn, kaj espereble ankaŭ novajn nomojn.

Mi ŝatus informi vin, kiuj programoj, programeroj estas planitaj. Kompreneble ĉiutage ni havos matenajn kaj vesperajn preĝojn, kiuj povos okazi en la belega mezepoka preĝejo, kiu estas apud la kongresejo, kaj ankaŭ nia dimanĉa diservo estos tie.

Estas kutimo, ke dum la kongreso estas unu tuttaga kaj unu duontaga ekskursoj. La tuttagan ekskurson ni planas fari en la ĉirkaŭaj vilaĝoj, kie estas troveblaj pluraj belegaj, mezepokaj memoraĵoj, preĝejoj kaj aliaj vidindaĵoj. Dum la duontaga ekskurso ni verŝajne vizitos etnografian muzeon en unu el la najbaraj urboj.

Dum la kongresoj ni ĉiam havas eblecojn auskulti prelegojn. Ni havas plurajn geamikojn, kiuj kutime alvenas kun preparitaj interesaj prelegoj, kiujn ankaŭ ĉijare ni kun danko atendas. Jam aliĝis ankaŭ nova-estonta amiko, Ed Borsboom el Nederlando, kiu volonte prelegos pri Andreo Cseh kaj pri lia fama intrumetodo.

Se vi travivis, lernis aŭ legis ion impresan, dividu tiun travivaĵon kun ni, ni volonte aŭskultos kaj priparolos ankaŭ mallongajn kontribuaĵojn. Ankaŭ mi planas prelegi kun la titolo 'Wang' (mi ne diras pli, por ke vi estu ege scivolaj, kaj se vi ankoraŭ ne aliĝis, nun tuj faru tion).

Nia kara fratino Vera Tuinder estas preta gvidi matenajn jogoekzercojn, ke ne nur anime ni evoluu dumsemajne.

Kompreneble ni havos ankaŭ amuzajn programojn. Mi planas montri al vi belegan hungaran filmon (kiu parolos esperant-lingve), kaj ni ankaŭ ekkonos la muzikan kaj dancan popolarton de la regiono.

Ne eblas fermi nian kunestadon sen amuza vespero, do ne forgesu prepari, "kunporti" ion ŝercan, gajan al tiu programero!

Karaj gefratoj, mi multe esperas, ke ni havos belan, benitan kongreson. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ne hezitu decidi kaj veni al mia belega lando. Dio benu vin ĉiujn!

*Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS*

**BEREGDARÓC**

| Nr. | Nomo | Lando |
|---|---|---|
| 1. | Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS | Hungario |
| 2. | Bengt Olof ÅRADSSON | Hungario |
| 3. | André ÅRADSSON | Svedio |
| 4. | Katalin BÁNÁTI | Hungario |
| 5. | Sieglinde STAMM | Aŭstrio |
| 6. | Szabolcs BIRTA | Rumanio |
| 7. | Jacques TUINDER | Nederlando |
| 8. | Vera TUINDER | Nederlando |
| 9. | Pavel POLNICKÝ | Ĉehio |
| 10. | Samuel GAILLARD | Francio |
| 11. | Karl Heinz SCHAEFFER | Germanio |
| 12. | Hedwig SCHAEFFER | Germanio |
| 13. | Norbert SÜDLAND | Germanio |
| 14. | Gabriella STIER | Rumanio |
| 15. | Mária LÁSZLÓ | Rumanio |
| 16. | András Zsolt TASNÁDI | Rumanio |
| 17. | Gavril SCURT | Rumanio |
| 18. | Terézia Ildikó SCURT | Rumanio |
| 19. | Antal FARKAS | Rumanio |
| 20. | Margit-Judit OLAH | Rumanio |
| 21. | Eugenia-Ecaterina POPOVICIU | Rumanio |
| 22. | János WEISZ | Rumanio |
| 23. | Irén BAGI | Hungario |
| 24. | Erzsébet PÁRKÁNYINÉ KASZAB | Hungario |
| 25. | Oldřich Arnost FISCHER | Ĉehio |
| 26. | Éva FARKAS-TATÁR | Hungario |
| 27. | Siegfried KRÜGER | Germanio |
| 28. | Britta REHM | Svedio |
| 29. | Markus HOLZÄPFEL | Hungario |
| 30. | Åke AHLRÉN | Svedio |
| 31. | Wil van GANSWIJK-VLASBLOM | Nederlando |
| 32. | Els van DIJK | Nederlando |
| 33. | Ed BORSBOOM | Nederlando |
| 34. | Philipe COUSSON | Francio |
| 35. | Mila HODUSOVA | Rusio |
| 36. | Viktor GROMOV | Rusio |

# Informetoj

## Estimata, saluton...,

Mi estas pastoro John Bright Lightson, fondinto de ASOCIO DE ĈIUJ DENOVNASKIĜINTAJ KRISTANOJ. Mi volas kunlabori kun ĉiuj gekristanoj tra la tutmondo por plenumi la volon de nia Sinjoro Jesuo Kristo kiel skribita en Sankta Johano 17:21-23.

Jen mia adreso:
Pastoro John Bright Lightson
Asocio de Ĉiuj DenovNaskiĝintaj Kristanoj
11 BP 314 Lome 11-Togo
E-poŝto: rev_lightson@yahoo.com

Jen la adreso de nia asocio:
Asocio de Ĉiuj DenovNaskiĝintaj Kristanoj
11 BP 314 Lome 11-Togo
E-poŝto: acdnk_togo@yahoo.com

## Sekretaria peto

Karaj gefratoj, se Vi planas partopreni Universalan kongreson en Havano, nepre informu min, ĉar mi devas prizorgi KELI (+IKUE) kunvenon.

Dankon
Pavel Polnický
Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
cea.polnicky@quick.cz

## Vi

La Ŝildo kiun neniu sago povas trabori
La sago kiu povas bori ĉian ŝildon
Kiu estas Vi?

## Vi

Kies spuroj aperas sur la maro,
Brulanta Fajro, saniganta Akvo:
Kiu estas Vi?

## Vi

La Unua kaj la Lasta,
La Ĉiu kaj Ĉiuj
Vi estas Dio!



Tiun ĉi poemon mi verkis laŭ la tradicia Joruba (mia tribo) kredo pri Dio.

Olubunmi Gabriel Osho-Davies